

La Bulteneto

Numero 57  Julia Isbrücker-Jaro 2020

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN



BAROKA JUVELO
LA KASKADA PUTO DE SCHLOSS HOF

La Bulteneto

Numero 57  Julia Isbrücker-Jaro 2020

Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko bulteneto

Redaktejo - eldonejo - presejo:

Rudolfnergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio

Tekstoj: Renate kaj Walter Klag

Reviziis Irene Klag

esperanto@chello.at

Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono

Prononcoj kaj klarigoj

Schloss [ŝlos] Hof, baroka palaco oriente de Vieno, signifas Kastelo Korto.

Johann Lukas von (=de) Hildebrandt [hildebrand], Ĝenovo 1668 - 1745 Vieno.

Liaj gepatroj estis germanlingvanoj. Li studis arton kaj arkitekturon en Romo.

Maria Theresia [terézia] de Habsburg, Vieno 1717 - 1780 Vieno.

Großenbrunn [grójsenbrun].

Für die Übersendung vieler Fotos danken wir Frau Mag. Evelyn Larcher,
Unternehmenskommunikation und Öffentlichkeitsarbeit,
Schloß Schönbrunn Kultur- u. Betriebsges. m. b. H.

Sur la titolpaĝo kaj sur paĝo 3:

Parto de pentraĵo de Bernardo Bellotto, nomita Canaletto [kanaletto].

Li naskiĝis 1721 aŭ 1722 en Venecio kaj mortis 1780 en Varsovio.

Supre la palaco Schloss Hof, meze la granda kaskada puto,
sube la malgranda.

Kopirajto © KHM.



Historio de Schloss Hof

En la jaroj 1726-1732 Princo Eŭgeno de Savojo konstruigis imponan kastelon kaj belegan barokan ĝardenon 50 km oriente de Vieno. La arkitekto estis Johann Lukas von Hildebrandt. La germana imperiestrino Maria Theresia aĉetis la palacon 1755.

La ĝardeno Schloss Hof konsistas el sep terasoj. La kastelo staras okcidente sur la dua teraso. Kiel ŝtuparo sekvas la tria ĝis la sepa teraso en orienta direkto, pli kaj pli suben. La granda kaskado (paĝo 1 kaj 16) situas inter la kvina kaj sesa teraso. La akvo venis el la vilaĝo Groißenbrunn tri kilometrojn okcidente de la kastelo. La ligna akvodukto liveris nur 15 m^3 da akvo en unu horo, sed por daŭra aktivado de la akvofalo necesas 400 m^3 da akvo en unu horo. Eble la kaskado neniam funkciis kiel oni vidas sur la pentraĵo (paĝo 1).



La ĝardenaj terasoj de Schloss Hof:
Supre la unua, sube la sepa.

© Stefanie Grüssl BHÖ kun danko al la aŭstria armeo.

Post la morto de Maria Theresia (1780) la tuto kadukiĝis. La konstruaĵoj uziĝis de la armeo, la ĝardeno iĝis ĝangalo.

Je la fino de la 19a jarcento la granda kaskado estis ruino. Tial oni anstataŭigis ĝin per ŝtona muro uzante la restantajn blokojn de la kaskado.

La rekonstruado komenciĝis 2002. Unue oni formetis la ŝtonan muron kaj ordigis la diversajn blokojn. De la reliefoj, kiuj troviĝis ambaŭflanke de la akvofalo, multo estis perdita, tamen eblis rearanĝi kelkajn fragmentojn kaj oni povis ekhavi ian ideon, kiel aspektis la baroka originalo.


Evidentiĝis, ke la figuroj, kiuj aperas sur la pentraĵo de Canaletto (paĝo 1), ne montras la realecon. Fakte temis pri kvar scenoj el la metamorfozoj de Ovido: La verdikto de Midaso; la torturado de Marsiaso; Apolono kaj Koronis; Apolono kaj Sibilo de Kumo.



Fragmentoj de la kvar reliefoj, kiuj troviĝis ambaŭflanke de la akvofalo. © Schloss Hof



Fragmento de la kvar reliefoj, kiuj troviĝis ambaŭflanke de la akvofalo. © Schloss Hof



Kunmetado de reliefaj fragmentoj per komputilo.
Maldekstre la videbla flanko kun skulptaĵoj,
dekstre la nevidebla malantaŭa flanko sen figuraĵo.
© Arge Große Kaskade



Betona muro okcidente de la suba baseno
kaj instalaĵo por la funkciado de la akvofalo.
Malantaŭ la betona muro situas la supra baseno, nevidebla sur la foto.
© BDA Irene Dworak.



La sama vidata el la sudo.
© BDA Irene Dworak.



Rekonstruaj laboroj. © BDA Irene Dworak.



Muntado de la reliefaj fragmentoj. © BDA Irene Dworak.



© BDA Irene Dworak.



La granda kaskado kaj ambaŭflanke la kvar parte rekonstruitaj reliefoj.



La supra baseno de la granda kaskado.

© BDA Irene Dworak.



© BDA Irene Dworak.



Malfermo de la sepa teraso en 2019.

De dekstre:

Diplominĝeniero Bernhard Rödl, ĝardena prizorganto de Schloss Hof;
Inĝeniero Werner Sellinger, afergvidanto
de la firmao „grünplan“ (verda plano);
D-ro Hermann Fuchsberger, konservatoro de monumentoj
de la lando Suba Aŭstrio (Niederösterreich);
Ĵurnalistino.

© Dieter Nagel por SKB.



Montrado de historiaj kostumoj okaze de la malfermo de la sepa teraso
de la ĝardeno de Schloss Hof.

2019.

© Dieter Nagel por SKB.

FOKUS

DENKMAL

10

Hermann Fuchsberger (Hrsg.)

Der Kaskadenbrunnen von Schloss Hof



DENKMAL FORSCHUNG | SCHUTZ | PFLEGE

BDA

Kovrilo de libro pri la kaskada puto de Schloss Hof, ISBN 978-3-85028-894-1

Informoj kaj anoncoj



Floro de frago fotita de Irene Klag 2020

Daten und Fakten

1887	Das erste Esperanto-Lehrbuch erscheint
1905	1. Esperanto-Weltkongress in Boulogne-sur-Mer (Frankreich)
1908	Gründung des Esperanto-Weltbundes UEA in der Schweiz: www.uea.org
1912	Die ersten Spesmilo-Münzen werden geprägt
1922	Erste Radiosendungen in Esperanto (Newark und London)
1938	Gründung des Esperanto-Jugendweltbundes TEJO: tejo.org
1959	Die ersten Stelo-Münzen werden geprägt
1965	50. Esperanto-Weltkongress in Tokio, der erste Weltkongress in Asien
1966	Pasporta Servo erscheint erstmalig: www.pasportaservo.org Heute 1800 esperantosprachige Gastgeber in über 100 Ländern
1970	Das Definitionswörterbuch Plena Ilustrita Vortaro wird herausgegeben: kono.be/vivo oder vortaro.net
1980	Die Monatszeitschrift Monato erscheint erstmals: www.monato.net
1986	Erstmals ein Esperanto-Weltkongress in Beijing, China; neuerlich 2004.
2001	Chuck Smith (USA) gründet die esperantosprachige Wikipedia: eo.wikipedia.org
2002	Der Internet-Esperantokurs lernu startet: www.lernu.net Mehr als 300 000 Anmeldungen bis 2020
2006	Herzberg am Harz (Niedersachsen) wird offiziell Esperantostadt: esperanto-urbo.de
2008	Erstmals Esperanto-Prüfungen nach dem Gemeinsamen Europäischen Referenzrahmen: www.edukado.net/ekzamenoj/ker
2011	Gründung von Muzaiko (Esperanto-Musik): www.muzaiko.info
2012	Google macht Esperanto-Übersetzungen
2014	Erstmals Esperanto-Fernsehen: Google > esperanto televido
2015	Duolingo – Neuer Esperantokurs für Englischsprachige, danach auch für Spanisch- und Portugiesischsprachige: www.duolingo.com Über 2 Millionen Anmeldungen bis 2020
2017	102. Esperanto-Weltkongress in Seoul (Südkorea)
2018	Die silberne 100-Steloj-Münze wird herausgegeben
2019	75. Esperanto-Jugend-Weltkongress in der Slowakei
2019	104. Esperanto-Weltkongress in Lahti (Finnland)
2020	76. Esperanto-Jugend-Weltkongress in Someren (Niederlande)
2020	Zum Julia Isbrücker-Jahr erscheint eine silberne 50-Steloj-Münze
2020	eventa servo verzeichnet hunderte aktuelle Esperanto-Veranstaltungen
2021	106. Esperanto-Weltkongress in Belfast (Nordirland)
2021	77. Esperanto-Jugend-Weltkongress auf der Insel Jeju (Südkorea)
2022	107. Esperanto-Weltkongress in Montreal (Kanada)



Leute finden, die Esperanto sprechen



<https://amikumu.com/eo>



Diskonigu esperantajn eventojn tutmonde!

Listo de internaciaj eventoj en 2020 →

tejo



Kartaro Kalendaro Mapo

Afriko 2 Ameriko 166 Azio 24 Eŭropo 739 Oceanio 21 Reta 10

Internaciaj eventoj Lokaj kunvenoj Kursoj Aliaj
Unutagaj Plurtagaj



Okazas hodiaŭ Proksimajn 7 tagojn Proksimajn 30 tagojn Estontece

<https://eventaservo.org>

DIE SILBERMÜNZE-MEDAILLE

100 STELOJ

EIN SPITZENPRODUKT DER MÜNZE ÖSTERREICH



Anlass: 150. Wiederkehr des Geburtstages von René de Saussure am 17. März 2018

René de Saussure war ein Schweizer Sprachwissenschaftler und der Erfinder des universellen Geldes. Sein Bruder Ferdinand de Saussure war der Begründer der modernen Linguistik.

Limitierte Auflage: 1000 Stück, keine Nachprägungen. Durchmesser: 37 mm.

Oberfläche: Stempelglanz - PP. Lieferung in einer Kunststoffkapsel.

Masse: 1 Unze Feinsilber 999/1000 (31,1 Gramm). Zertifikat wird mitgeliefert.

Aus gesetzlichen Gründen ist die Silberpunze 925 aufgeprägt.

Herausgeber und Entwerfer: Mag. Walter Klag.

Künstlerische Feinarbeit: Mag. Helmut Andexlinger, Chefgraveur der Münze Österreich.

Hersteller: Münze Österreich, Wien 3., Am Heumarkt 1; muenzeoesterreich.at

Die Münze Österreich ist eine 100%ige Tochter der Österreichischen Nationalbank.

Preis 50 € plus Versandkosten (gilt für Euro-Länder).

Lieferung nach Vorauszahlung des Betrages. Bitte schreiben Sie die genaue Zustelladresse (gegebenenfalls auch die Wohnungsnummer) an esperanto@chello.at.

Mag. Walter Klag, 1190 Wien, Aösterreich.

La renaskiĝo de la Steloj

Antaŭ kvin jaroj kaj duono, dum FESTO 2012 en Métabief, Alexandre 'Aleĉjo' Raymond venis al mi kun freneza sed interesa ideo: eldoni Esperanto-monon. Tiutempe FESTO multe inovaciis, ĝi eldonis proprajn tasojn, ĉemizojn kaj pli. Dum la renkontiĝo grupo de homoj ĉirkaŭ tablo diskutis kiel aspektu la moneroj, kiom ili valoru kaj kiel ili funkciiu.

Post la somero Aleĉjo kontaktis kun presejo de plastaj moneroj por taksi, kiom realigebla estas la ideo. La plano fine aspektis jena:

- Estu moneroj de 1, 3 kaj 10 Steloj. Tio ebligas rapidan pagadon de diversaj eblaj monsumoj.
- La moneroj estu malsamkoloraj kaj malsamgrandaj, por ebligi facilan kaj rapidan uzon.
- La koloroj estu ruĝa, flava kaj verda, kaj la simboloj gufo, papago kaj krokodilo.
- La valoro de unu Stelo egaligu al la plej malgranda kutima elspezo en trinkejo aŭ gufujo, do unu taso da teo aŭ unu glaso da kolao.

La finaj desegnoj estis senditaj kaj 3000 moneroj estis presitaj en oktobro 2012. Bonŝance en la fino de oktobro okazis malgranda renkontiĝo, kiun mi kunorganizis: Klaĉ-Kunveno Post-Somera en Nederlando. Ĝi estis perfekta por testi la novan monosistemon. La publiko ŝatis la monerojn, kaj sukcesis adaptiĝi al ĝia uzado. Post KKPS la Itala Esperanto-Junularo iĝis kuninvestanto de la projekto. La originala valoro estis difinita kiel 4,2 Steloj en unu eŭro. Poste la valoro estas ligita al la inflacie kompensitaj valoroj de eŭro, realo kaj zloto kun pezaj de 76%, 20% kaj 4%. Do same kiel la antaŭa Stelo, tiu ĉi Stelo teorie tenos sian valoron. Ekde 2012 ĝis 2017 la valoro de unu eŭro en Steloj variis inter 4,040 kaj 4,581. La Steloj estas ĉefe uzataj en trinkejo de junularaj Esperanto-renkontiĝoj. Ili estas valida pagilo en KKPS 2012-2017, IJF 2013-2017, JES 2012 kaj 2017, SES kaj FESTO 2013 kaj IJK 2015. Krome ili uziĝis en kelkaj trajnkaravanoj kaj eblas mendi ilin poŝte ĉe Aleĉjo aŭ Roĉjo.

La avantaĝoj de Steloj en trinkejo estas la facila uzo, la malalta pezo relative al metalaj moneroj, kaj la fiero havi specialan Esperanto-monon. La ĉefa malavantaĝo estas la bezono interŝanĝi alian monon kontraŭ Steloj en la komenco de la renkontiĝo. La kvanto presita en 2012 devus sufiĉi por uzo en eĉ la plej grandaj junularaj renkontiĝoj. Se ilia uzo aŭ kolektado ekster la junulara movado ankaŭ kreskos, tiam dua presado estos pripensinda.



Rogier 'Roĉjo' Huurman

Bildoj: <https://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo>

Bonvolu mendi la plastajn Stelojn ĉe rogier.huurman@gmail.com

Julia Isbrücker-Jaro 2020

Invito al kunlaboro

2020 estas la 100a datreveno de la 12a Universala Kongreso en Hago (1920). Julia Isbrücker kunorganizis ĝin. La realigo de tiu kongreso pruvas, ke ankaŭ granda milito ne povas neniigi Esperanton. Julia kunfondis Internacian Esperanto-Instituton kaj Universalan Ligon kaj kuneldonis la metalajn Stelo-monerojn, kies nominaloj estas 1, 5, 10 kaj 25 Steloj.



Sur la monero Julia Isbrücker, desegnita de mag. Helmut Andexlinger, la ĉefdezajnisto de Münze Österreich, 2020.

2020 aperis arĝenta 50-Stela monero por la honoro de Julia Isbrücker: Maso 30 gramoj da arĝento 925/1000, diametro 40 mm, eldonkvanto 300. Surfaco: Polurita („proof”). Prezo 60 € plus sendokostoj (validas por eŭro-landoj).



Bonvolu sendi al mi tekstojn kaj fotojn de kaj pri Julia. La kolektita materialo aperos kaj en la formo de vikipediaj artikoloj en diversaj lingvoj kaj kiel broŝuro. En la fina eldonaĵo via nomo estos menciita.

Walter Klag, esperanto@chello.at.

Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la fakgrupo „Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo „Esperanta Numismatiko”, probable la ununura tia fakgrupo en la historio de Esperanto.

La instiga fakto estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian **terminaron**.

2014 - 2020 ENA varbis mondvaste 140 individuajn membrojn kaj 22 asociajn membrojn.

Agrable por ni kaj vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas **SENPAGE** aliĝi (sufiĉas respondi: „Mi konsentas aliĝi”). Krome la **NUR PERRETA** revuo estas tute **SENKOSTA**! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn, 4 numerojn jare.

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA. Se vi deziras kromajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

Vi rajtas unue peti provnumeron! Vi decidus poste!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de „Esperanta Numismatiko”



Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9

Haltestelle Herrengasse der U3

☎ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h

Donnerstag 10 bis 21 h

Esperantokurse und Führungen auf Anfrage

Im selben Haus befinden sich auch die

Musikaliensammlung

und das

Globenmuseum